

# Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

## “Hamalogio” denove prezentita — 3 prelegoj en februaro —

Sibayama Zyun'iti

En la 17a de februaro, en nia kutima kunvenejo, 16 personoj kunsidis kadre de “Hama-Ronda Vespero”, por aŭskulti 3 prelegojn rilatajn al “Hamalogio”.

Nu, “Hamalogio” estas studo pri nia urbo Jokohamo (kiun loĝantoj japanlingve simpligas kiel “Hama”). En la lastajara 104-a Japana Esperanto-Kongreso en nia urbo, 6 loĝantoj de Jokohamo prelegis pri sia ŝatata temo. Sed ni membroj mem ne havis multan ŝancon aŭskulti, ĉar multaj el ni volontule laboris por la Kongreso. Tial, okaze de nia regula kunsido, ni havis ŝancon aŭskulti 3 el ili. En la venonta marto, ni aŭskultos la restantajn 3. Cetere, ĉi-fojaj 3 prelegoj havas sian resumon en nia lastajare publikigita libro “Gvidlibro pri Jokohamo, kun Eseoj Hamalogiaj, 2017”. Tial interesatoj enmanigu tiun kolorplenan libron (208 paĝoj, 1900 enoj) kaj legu detale.

Jen resumo de la prelegoj.


### (1) “Per akvo - Interrilato inter Jokohamo kaj iu vilaĝo” de Namba Fumiharu

Parto el la trinkakvo de Jokohamo venas de intermonta vilaĝo Dooŝi en la Gubernio Yamaŝi, tra tuboj longaj je 50 kilometroj. Tio estas jam de 1916, kaj tiel liverata akvo estis ŝate konservita de la ŝipistoj, kiuj enŝipigas akvon al ŝipo ankrita al la internacia haveno

Pejzaĝo de Dooŝi



Jokohamo posedas vastan arbaron en Dooŝi



Jokohamo. Pro tiu longa historio, la vilaĝanoj estas tre simpatiaj al Jokohamo, kaj iam eĉ proponis anekson de sia vilaĝo al Jokohamo, kio tamen ne estis realisma. La preleginto aŭte vizitis la vilaĝon kaj ĝuis la naturplenan atmosferon.

(2) “Tokaido, fervoje kaj piedvoje” de Sibayama Zyun’iti

Tokaido estas nomo de piedira vojo inter nuna Tokio kaj Kioto de antaŭ 400 jaroj, kaj 3 vojstacioj, nome komplekso de gastejoj, manĝejoj ktp el 53 troviĝas en la nuna urbodistrikto de Jokohamo. Kaj vilaĝo nomata Jokohamo siatempe estis nur fiŝista vilaĝo ne laŭlonge de tiu Tokaido. Ĉar en 1859, oni

ekkonstruis havenon por internacia komerco en tiu loko, la urbo Jokohamo komenciĝis kaj pli kaj pli larĝiĝis. Do kiuvoje oni konstruis novan fervojon inter Tokio kaj Osako tra Kioto, la Fervojlinion Tokaido, ĝisirinte aŭ preteririnte la centron de Jokohamo? Tio estis la ĉefa temo.




(3) “Biero en Jokohamo” de Suzuki Keiichiro

Jokohamo, kiel unu el la urboj plej frue malfermitaj al eksterlanda komerco, estis la unua urbo en Japanio por fari bieron fare de usonano. La preleginto migris de loko al loko la historiajn lokojn de la bierfarado en Jokohamo. En la posta epoko, bierfarado fariĝis granda industrio tra la lando. En la lastaj jaroj, tamen naskiĝis nova tendenco, ke en malgranda

distrikto, do en Jokohamo oni ekfaris “metian bieron” (angle: craft beer), kaj estis ankaŭ festoj de metiaj bieroj en Jokohamo.

Cetere, post tiu ĉi prelega evento, kelkaj el la kunsidintoj vizitis unu el la trinkejoj de tia metia biero nomata Yokohama Bay Brewing, estrata de la filo de la preleginto.



Japan Brewery ĉirkaŭ 1885 (la pionira bierejo en Japanio)



tombo de William Copeland, pioniro de bierfarado en Japanio

---

---

## Prelego

---

---

### Miaj memoroj pri Prof. Ivo Lapenna (2)

Glauco Pompilio

#### La vivo de Lapenna (2)

Post la dua mondomilito li unue estis ĉefo de la Departemento pri Hejma Preso de la Popola Respubliko Kroatio kaj iom poste redaktoro de la Oficiala Gazeto de la sama Kroatio.

Sekvis laŭvice: docento, iom poste profesoro pri Internacia Juro kaj Internaciaj Rilatoj en la Jura Fakultato de la Universitato de Zagrebo; samtempe lekciisto pri Historio de Diplomatiaj Rilatoj kaj Historio de Politikaj Doktrinoj; paralele honorariata lekciisto pri Internaciaj Rilatoj en la Ekonomika Fakultato.

En 1946 li partoprenis la Packonferencon en Parizo kiel eksperto pri internacia juro en la jugoslavia delegacio.

En la postaj jaroj Ivo Lapenna fariĝis konata personeco en Jugoslavio: Advokato-Konsilisto antaŭ la Internacia Kortumo en Hago, membro de Jugoslavia Akademio de Sciencoj kaj Artoj, ricevanto de la ordeno “Meritoj por la Popolo”, partopreninto de internaciaj jursciencaj konferencoj en Beogrado, Parizo, Bruselo kaj ĉe la Akademio de Internacia Juro en Hago.

Sed ironie: kiam, en 1949, li estis honorigata en Jugoslavio, jam antaŭe li decidis forlasi sian landon por iri okcidenten.

La decido forlasi propran landon estas ĉiam eksterordinare malfacila kaj doloriga, kaj tute speciale kiam – kiel en la kazo de Ivo Lapenna – estas neniu klara ekstera kaŭzo por tio. Li estis treege sukcesa kaj lin minacis neniu danĝero. Li ekŝiĝis ĉar li amis la liberon kaj ĉar li ne povis toleri la manieron laŭ kiu la aferoj evoluis sub la tiama registaro, konsistanta el la samaj homoj kontraŭ kiuj Lapenna batalis por libero kontraŭ la naziistoj kaj la faŝistoj.

Post loĝado dum kelkaj jaroj en Francio li translokiĝis en Britio kie, post longaj burokrataj formalajoj, li akiris britan ŝtatanecan.

Ivo Lapenna venis al Britio regante la kroatan, italan, germanan, rusan lingvojn sed ne la anglan. Estas karakterize por lia persistemo ke, malgraŭ plena manko de afineco al tiu lingvo, li lernis ĝin en mallonga tempo kaj komencis skribi en ĝi

leterojn, artikolojn kaj poste fakajn librojn. Kaj, fine, ekde 1955, li akiris la postenon de profesoro pri Kompara Sovetia kaj Orienteŭropa Juro ĉe la prestiĝa Universitato de Londono, kie li instruis ĝis sia emeritiĝo en 1977.

Tamen, malgraŭ la emeritiĝo kaj fakte laŭ peto de la universitataj aŭtoritatoj li daŭrigis sian kutiman universitatan laboron ĝis Oktobro 1987.

Ivo Lapenna forpasis en Kopenhago la 15-an de Decembro 1987.

#### Lapenna kaj mi

Ni revenu nun al Esperantujo.

Kiam Prof. Lapenna proponis mian nomon al la Estraro por la posteno de Konstanta Kongresa Sekretario (KKS) evidente li vidis en mi kelkajn kvalitojn, pri kiuj eĉ mi mem ne plene konsciis, kiuj povis esti taŭgaj por gvidi kaj kunordigi, profesie, la decidojn kaj la agadojn de la membroj de la Lokaj Kongresaj Komitatoj, certe ĉiuj bonvolaj homoj sed fakte diletantoj en la organizo de Universalaj Kongresoj de Esperanto.

Tamen se mi akiris certan sukceson en tiu posteno, tio estis ankaŭ dank’ al la konsiloj kiujn Prof. Lapenna estis ĉiam preta disdoni kaj kiujn mi estis pli ol feliĉa aŭskulti kaj sekvi.

Tiuj konsiloj temis ĉefe pri homaj rilatoj – kiel agi en la rilatoj kun homoj kunlaborantaj por la sama celo, kiel rilati kun homoj kiuj, pro manko de praktika senco aŭ, plej grave, pro troa konsidero pri si mem, ne vidas la maltaŭgecon de siaj eventualaj proponoj.

Mi esperantiĝis en la 1950aj jaroj kaj el tiuj ĉi multaj jaroj de esperantisteco – ĉu amatora ĉu profesia – la pli ol dek jaroj dum kiuj mi kunlaboris kun Ivo Lapenna estis certe la plej riĉaj.

Ĉar, malgraŭ kelkfoje malfacilaj cirkonstancoj, laborante kun li ĉiam oni lernis, ĉiam oni povis ĝui lian talenton, lian lingvouzon, lian erudicion. Li postulis maksimumon de si mem kaj, kompreneble, li atendis la samon de siaj kunlaborantoj.

“Kara Pompilio – li ĉiam alparolis min



tiamaniere, kun la ĉiama cigaredingo inter siaj fingroj – kiel KKS vi havas la rajton kontraŭstari proponojn kaj decidojn de Loka Kongresa Komitato (LKK), se vi opinias ilin netaŭgaj por la Kongreso kaj por UEA.

Sed atentu! Se tiuj proponoj aŭ decidoj ne grave influos sur la bonan rezulton de la celo, akceptu ilin, donu al tiu kiu elpensis ilin la plezuron supozi ke ankaŭ ties kreaĵoj kontribuas al la formigo de la Kongreso. Lasu ke la elpensanto mem poste konstata la maltaŭgecon de la propono. Tion farante, pli facile vi povos en posta okazo vin pravigi kiam vi nepre devas rifuzi proponon aŭ decidon, kiu estas nepre maltaŭga.”

Kaj mi memoras alian bazan konsilon.

“Sciu ke en LKK vi estas ‘la unua inter samranguloj’ – tion ĉi li eĉ diris en la originala latina versio (*primus inter pares*), fidante je mia itala deveno kaj je miaj lernejoj studoj. –

“Memoru ke vi neniam devas doni al viaj kunlaborantoj la impreson ke vi volas alpreni ĉiujn meritojn kaj ke nur vi kapablas eligi novajn kaj taŭgajn ideojn – eĉ se tiel estus. Aŭskultu kaj pridiskutu la ideojn kiuj venas al vi de viaj kunlaborantoj. Sed ĉefe igu ilin, pere de taŭgaj argumentoj, eligi tiujn ideojn, kiujn vi mem opinias taŭgaj por la celo kaj kiujn vi mem proponus. Tiam tiu, kiu naskis la ideon, rajtas fieri pri tio – ĉar fakte de tiu estas la ido, eĉ se la komenca embrio estas via – kaj vi ne estas kulpigita pri troa altrudo.”

Ĉu makiavela penso? Eble. Sed en la konkreta kaj praktika signifo de la termino. Ĉar tiu konsilo ne implicas, makiavele, ke la ‘celo pravigas la rimedojn’, sed ke valida organizanto aŭ, ĝenerale, respondeculo devas helpi siajn kunlaborantojn realigi sin mem – kompreneble por la bono de la komuna celo.

Verŝajne – ni diru tutcerte – ankaŭ mi mem estis unu el tiuj kunlaborantoj de Prof. Lapenna el kiuj li kapablis eligi kvalitojn kiuj povis esti utilaj kaj utiligataj por niaj celoj.

Mi estas ĉiukaze dankema al li kaj al la spertoj kiujn mi akiris dum tiu kunlaborado, ĉar estis tiuj spertoj kiujn mi poste aplikis ĉiutage kaj kiuj igis sukcesa mian postan okupon. *(fino)*

## Niaj Planoj

([KK]=nia kutima kunvenejo, nome Kanagawa-Kenmin-Senta, proksime de la Stacidomo Jokohama)

\*apr. 21 [KK] Hama-Ronda Vespero: Pri Portugalio, la lando de UK – diversaj aferoj pri la historio, turismo, lingvo ktp.

\*maj. 1 - 7 [Galerio Minatomirai]: En galerio urbocentra, vasta je 81 kvadrataj metroj, ni ekspozicios pri Esperanto.

\*maj. 19 [KK] Hama-Ronda Vespero: japanlingva prelego de socimovadisto, s-ro Nomoto Sankiti, simpatianto de nia lingvo. Li parolos kion li atendas de Esperanto.

## Niaj klasoj kaj kursoj

Okazas jenaj klasoj (kutime en [KK])

\*Regulaj Klasoj en sabato:

(1) Klaso “Eseoj” por legi “Tamen ĝi moviĝas!” gvidate de Doi Hirokaz

(2) “Jokohama Salono”: 2 fojojn monate oni legas “Mondo de travivaĵoj” de Tibor Sekelj, 1 fojon - libera frazfarado; kaj alian fojon - tradukado laŭ sia plaĉa fonto

(3) Rudimenta Kurso, de la 17a de februaro, ĝis la 28a de aprilo, kun 2 kursanoj, gvidate de Fuse Kentaro kaj Doi Ĉieko

\*Regulaj Klasoj en merkredo:

(1) Klaso “Belĉielo”, por legi “Punkuino”, gvidate de Doi Ĉieko

(2) Klaso “Belflora”, por legi “Punkuino”, gvidate de Doi Ĉieko

(3) Klaso “eriko”, por legi “La Zamenhof-Strato” gvidate de Doi Ĉieko

## Redaktoro parolas

Dankon al niaj eksterlandaj legantoj, kiuj ricevos la gazeton NUR rete, sed ne poŝte.

Ĝis nun jenaj personoj konsentis je tio.

Ni daŭre atendas vian sinanoncon.

1. s-ro José Antonio Vergara (Ĉilio)
2. s-ino Mireille Grosjean (Svislando)
3. s-ino Jana Rambousková (Slovakio)
4. s-ro Ji Yingeng (Ĉinio)
5. s-ro Carmel Mallia (Malto)